

STARTO

N-ro 2/2013 (247)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Esperantista renkontiĝo en Ŝumperk

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marĉek: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, vl.dv@centrum.cz, 774 999 091 (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz (membrodatumbazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.esperanto@gmail.com (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, miropiro2312@gmail.com (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, la komitato.

Eventoj internaciaj

okazis je la 27-a de aprilo 2013 en la ĉeĥa vilaĝo Lipnice nad Sázavou. Tie oni omaĝis la 130-an naskiĝdatrevenon de **Jaroslav Hašek**, la aŭtoro de la mondfame konata verko „Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk“ (Ŝvejk). La omaĝo havis du ĉefajn programerojn: nome la internacian konferencon, kiun partoprenis elstaraj mondaj „hašekologoj“ (vidu rim. sube), kaj la senŭualigon de monumento, kiu portas la nomon „HLAVA XXII“ (La kapo XXII)...



Kia estis ĉeesto de ni – esperantistoj: danke al organiza instigo de ĈEA-komitato, ni alvenis kelkdekaj, el „ĉiuj anguloj“ de nia lando. Unuavice ni vizitis la dometon, en kiu la aŭtoro vivis – kaj kiu nun estas aranĝita kiel MEMOREJO JAROSLAV HAŠEK. Petr Chrdle donacis al la memorejo esperantlingvan tradukon de Ŝvejk, kiun esperantistoj mem enmetis en vitrinon apud alilingvaj tradukoj. Poste ni estis akceptitaj de la vilaĝestro (tre agrable, eĉ kun refreŝiĝo) por komune planti „Esperanto-arbeton“. La

kaŝtan-arbeto taŭge apartenas al la maljuna kaŝtan-aleo, kiu ornamas la vilaĝon laŭtradicie. La agon iniciatis kaj la kostojn por la arbo kaj memor-tabulo sponsoris Max Kašparů, estro de la E-rondeto Pelhřimov.



„La homa vivo, obeeme mi raportas, sinjoro ĉefleŭtenanto, estas tiel komplika, ke la nura vivo de homo estas kompare kun tio bagatelo.“ (p. 661). En dek lingvoj inkluzive de Esperanto aperis tiu ĉi citaĵo el Ŝvejk sur la monumento.

La senŭualigo de l’menciita monumento (skulptita el loka „blua granito“) okazis posttagmeze sur granda herbejo, ĉ. 2 km sude de la vilaĝo. La kreintoj (desegnistoj, skulptisto k.a.) parolis kaj pri la celo, kaj pri la ideo – vidigi la absurdaĵon de l’ milit-serva dresado. Ĝuste tio estas kerno de la verko „Ŝvejk...“ (de Jar. Hašek) kaj de „La kapo XXII“ (same fama verko de Joseph Heller).

La nepo de J. H. – inĝ. Richard Hašek – elstarigis nome nin esperantistojn pro nia (mon)subteno de la afero. Tio okazis antaŭ kelkmila amaso da vizitantoj, kiuj la instalon de la skulptaĵo partoprenis.



Rimarko de supre: unu tago antaŭ la priskribita evento okazis gazetara konferenco (por ĉeĥaj amas-komunikiloj). Mi ankaŭ partoprenis (danke al invito de R.H.). Tie mi konatiĝis kun „haŝek-furiozo-favoranto“ – nome la norvego Jomar H., kiu 2 jarojn sekvis la realan vivon de J.H. de la tempo, kiam li soldatiĝis, ĝis reveno en sian patrolandon. Kompreneble, ke tiu Jomar prezentis sin ĉe la menciita konferenco...

„Subrimarko“: la gazetara konferenco okazis en la hotelo Majestic (Prago, Štěpánská), kiu enhavas en sia spaco la naskiĝdomon de J.H. – kaj tiu enhavas la naskiĝĉambron de la aŭtoro. Ni havis eblon vidi ĝin (en la tria etaĝo de la domo). Eniro en la domon: el la strato Školská, sur la domo estas memor-tabulo pri J.H.

*Margit Turková
fotis J. Tomeček*

Rimarko de la redaktoro: la esperantlingva surskribo sur la statuo estas merito precipe de inĝ. Margit Turková el Obořiště kaj s-ro Václav Kaprál el Plzeň

WikiTrans en Partizánské

Inter la 1-a kaj 5-a de majo 2013 okazis en la slovaka urbo Partizánské trejnado pri korektado de vikipediaj artikoloj faritaj el la angla per aŭtomata tradukilo WikiTrans, kiun kreis dana germano Eckhard Bick kunlabore kun Universitato de Suda Danio. La programo jam esperantigis 8 milionojn da artikoloj, sed kompreneble kun pli malpli gravaj eraroj. Nun la aŭtoro kreis programon por korektado de tiuj artikoloj per homaj fortoj kaj la trejnado celis konstati, ĉu la programo funkcias. Li persone ankaŭ alvenis kaj kun 7 homoj el Slovakio, Ĉeĥio kaj Hungario partoprenis la eksperimenton, kies rezulto estas artikoloj pri la filmoj de Chaplin.



La partoprenantoj, foto P. Baláž

Ŝton-ekspozicio en Herzberg

La urbestro Gerhard Walter de Esperanto-urbo Herzberg am Harz la 5-an de marto 2013 inaŭguris ekspozicion de pli ol 200 ŝtonaj salutoj el la tuta mondo, inter ili ankaŭ el Svitavy, Greziljono, Bona Espero, Gotenburgo kaj atom-bomba fandaĵo el Hiroŝimo.

„ESPERANTO KAJ MUZOJ“ KAJ MUZEA NOKTO 2013

La 8-an de junio 2013 estis inaŭgurita nova tutjara ekspozicio en nia Esperanto-Muzeo en Svitavy, ĉi-foje specialigita pri la temo arto.



La ekspozicio unuavide celas prezenti artan kreemon de ĉeĥaj esperantistoj: laŭalfabete Vladimír GRACIAS (kombino de ceramiko kun arta vitro), Mirka KOSNAROVÁ (ceramikaĵoj kaj tortoj), Majka KRÁČMAROVÁ (bildoj kaj juveloj kreitaj pere de enkaŭstiko), Stanislav KRAJÍČEK (penetraĵoj kaj ceramika betlehemo), Pavel RAK (ilustraĵoj, desegnita humuro), Mirka TOMEČKOVÁ (ilustraĵoj, dratado, peckudraĵoj), Anna VYŠŤINOVÁ (marcipanaj figuretoj kaj tortoj). En la fako artaj fotografiaĵoj troviĝas verkoj de Petr CHRDLÉ kaj

Pavla DVOŘÁKOVÁ, kies filino Edita (specialigita pri desegnado kaj artkudrado) reprezentas la junan generacion de aŭtoroj.

Ne mankas ankaŭ kreaĵoj de la membroj de la loka klubo de Svitavy.

La dua celo estis informi surpanele pri plejparte **profesiaj artistoj de vidaj artoj**, kiuj estis samtempe esperantistoj: ekzemple pri monde rekona-taj medalisto kaj vitristo Jiří HARCUBA, juvelisto Karel BARTOŠÍK kaj pri nacia artisto Martin BENKA, fondinto de moderna slovaka pentroarto. Pluaj interesaj nomoj estas ekz. brita portretisto Felix MOSCHELES (baptofilo de la komponisto Felix Mendelssohn-Bartholdy kaj la unua prezidanto de Londona Esperanto-Klubo), aŭ Ludovic Rodo PISSARRO (filo de la fama impresionisma pentristo Camille Pissarro). Oni povas vidi tie iliajn diverstemajn verkojn, ne nur tiujn kun esperantaj temoj.

El inter amikoj de Esperanto-muzeo el la retejo Ipernity aperis belaj bildoj de HO Song el Suda Koreio kaj Jozefo LEJČ el Brazilo. Ĉeestas ankaŭ verkoj de la renoma ĉeĥa ilustristo kaj pentristo, aktiva amiko de Esperanto, Věroslav BERGR. Multaj verkoj, kiuj ne eniĝis surpanelen, rigardeblas en apartaj trafoliumeblaj dosierujoj.

Krom artistoj pri vidaj artoj estas prezentataj ankaŭ profesiaj artistoj-esperantistoj el aliaj fakoj (ekz. kroata aktorino Vida JERMAN, pola poeto kaj eseisto Stanisław SKORUPSKI, usona komponisto David GAINES k.a.).

Pri aktorino Eva Seemannová kaj operkantisto Miroslav SMYČKA oni povas vidi rarajn ĝis nun en Esperantujo nepublikigitajn fotojn el artarkivoj.

Entute ĉi-foje kolektiĝis vere tre bunta aro da belaĵoj, en kiu espereble ĉiu vizitanto trovas ion interesan por perokula ĝuo kaj inspiro.



Por la partoprenantoj estis preparita ankaŭ **AKOMPANA KULTURA PROGRAMO**. Dum la unua esperantlingva parto je la 14-a horo eksonis Esperanto-kanzonoj de Lorenzo TOMEZZOLI el Francio (kiu kontribuis al la ekspozicio ankaŭ per siaj bildoj) kaj estis memorigita precipe verkaro de pluraj Esperanto-poetoj pere de iliaj poemoj. Komence eksonis „Sovaĝa kanto“ de d-ro Stanislav SCHULHOF, fondinto de Esperanto-klubo en Pardubice, konsiderata kiel la unua lirika Esperanto-poeto. Estis menciita proksimiĝanta 100-jara jubileo de naskiĝo de gitarvirtuozo profesoro Ŝtefo URBAN (1913-1974), kies unua edzino estis fama poetino Eli Urbanová. Oni povis aŭdi lian „Rondelon instruan“, plurajn

fablojn el lia kolekto „Nova Ezopo“ kaj ankaŭ lian gitarmuzikon.

Estis prezentita ankaŭ konfesa poemo „Aktorino“ verkita de Eva SEEMANNOVÁ kaj ŝia humura naskiĝtaga poemo skribita en formo de makaroniaj versoj (unuopaj rimiĝantaj versoj alterne en la ĉeĥa kaj en Esperanto). Sian propran poezion deklamis ankaŭ Zdenka NOVOTNÁ el Česká Třebová. Petr Chrdle konatigis kun pluraj libronovaĵoj el lia eldono, i.a. la tria eldono de lia verko „Profesia uzo de Esperanto“, kaj Margit Turková reatentigis pri la „Ĉeĥesperanta frazeologia vortaro“ de Josef Cink.

Fine la partoprenantoj povis konatiĝi kun granda usona komponisto Lou HARRISON (1917-2003), pioniro de minimumismo kaj mikrotona muziko, integrinta en klasikan okcidentan muzikon elementojn aziajn kaj indianajn. Harrison ankaŭ aktive parolis Esperanton kaj donis esperantajn nomojn al pluraj siaj komponaĵoj. Oni povis aŭskulti specimenon el lia „Koro-Sutro“, konata budhisma teksto en esperantigita versio. Kiel premiero estis kun sukceso projekciita filmeto pri turismaj vidindaĵoj de la urbo Strakonice, ĵus tradukita kaj esperantlingve dublita de Vladimír Türk, ĉi-foje ankaŭ kun partopreno de la voĉo de lia filino Vlad'ka.

La **solan inaŭguron de la ekspozicio** je la 16-a horo partoprenis ankaŭ gastoj el la urba publiko, i.a. Blanka ČUHELOVÁ, direktorino de la Urba Muzeo.

La aŭtorino de la ekspozicio Pavla Dvořáková komence informis pri celo kaj enhavo de la temo „Esperanto kaj muzoj“. El inter la ekspoziciantaj aŭtoroj Majka Kráčmarová el Hořice simpatie rakontis pri ŝia vojo al arta kreado kaj Petr Chrdle parolis pri sia pasio por fotografado. Korea pentristo Ho Song kaj en Britio vivanta juvelisto Karel Bartošík sendis al la partoprenantoj siajn personajn salutmesaĝojn. Pri la dua menciita artisto oni ankaŭ rigardis mallongan filmriperton.

Por ke ankaŭ neesperantistoj povu gustumi literaturan belsonecon de Esperanto, eksonis poezio de Fráňa Šrámek en prezento de Pavel Polnický.

El inter komponistoj-esperantistoj estis menciita granda rusa komponisto Sergej Ivanoviĉ TANEJEV (1853-1915), kiu evidente regis Esperanton kaj oni povis aŭskulti lian belegan muzikon „Templo de Apolono en Delfo“ el la opera trilogio „Oresteio“. Komencon de la trarigardo de la ekspozicio agrabligis kie ĉiufoje tre bongustaj kaj plaĉaspektaj frandaĵoj pretigitaj de la membrinoj de la loka Esperanto-klubo.

Je la 18-a horo estis inaŭgurita belaspekta kaj informriĉa **ekspozicio pri abelbredado** en la najbara Urba Muzeo kaj Galerio. Oni povis ankaŭ deproksime observi abelojn en travidebla abelujo, elfluigi mielon kaj gustumi ĝin kaj elprovi abelistan protektĉapelon ...

Vespere en la Domo de Ottendorfer ni povis mirakle reiri al la jaro 1911 kaj partopreni tiaman kulturalan programon. Inter la ĉeestantaj gravuloj kaj gastoj ĉeestis eĉ Klara Zamenhof, ludata de Marie Minářová el Svitavy, kiu alparolis la publikon esperantlingve. Rolon de la svitava deputito en Vieno Franz Jesser ludis alia membro de la loka esperantista klubo, Ján Bobřík.

Surpriza pinto de la programo estis kankano en nia muzeo, kiu tial venigis al nia ekspozicio multajn vizitantojn. Eĉ se multaj rigardis Esperanton nur mallonge, eble tio estis ilia unua vizito ĉi tie.



Danko apartenas al ĉiuj kontribuantaj artistoj, plue al ĉiuj, kiuj ofereme helpis dum la instalado kaj al ĉiuj, kiuj per sia persona partopreno venis subteni la aranĝon kaj ev. riĉigis ĝian programon. La ekspozicio „Esperanto kaj muzoj“ viziteblis ĝis majo 2014. Ni ĝojatendas sincere vian viziton!

Pavla Dvořáková

Renkontiĝo de esperantistoj en Marianka



Altaro en la pilgrimpreĝejo

Jam longe ne renkontiĝis IKUE-anoj el Ĉeĥio kaj Slovakio. Nun finfine venis ŝanco, inter la 17-a kaj 19-a de majo 2013 renkontiĝis trideko da partoprenantoj en plej antikva slovaka pilgrimloko Marianka apud Bratislava. En la ĉeĥa grupo estis ankaŭ membroj de la rondeto AMIKECO el Česká Třebová.



La paroĥestro rakontas pri la historio, interpretas M. Fejfiĉová

Dumvoje plurfoje minacis pluvo, sed venis nur nokte. Tiam ni jam estis loĝigitaj en la domo por pilgrimantoj, origine vasta klostro de kongregacio de fratoj konsolantoj. Ni admiris la

modernan ekipaĵon de la ĉambroj kontraste kun dikaj muroj, fenestretoj, volboj kaj ornamoj de la malnova klostra konstruaĵo.



Esperantistoj antaŭ kalvaria stacio

Jam vespere kaj ankaŭ matene ni povis ĉeesti sanktan meson en la pilgrimpreĝejo kaj aŭskulti pri ĝia historio. Poste ni ekmarŝis laŭ kalvaria vojo tra arbaro. Post la nokta pluvo eblis facile spiri, sed malfacile paŝi sur krutaj vojoj, precipe kelkaj maljunaj esperantistinoj kun lambastonoj havis problemojn. La unuopaj stacioj de la kalvaria vojo estis kreitaj per statuetoj en vitrinoj de kapeletoj.



La lasta kalvaria stacio

Junulino, laŭdire profesia fotistino, proponis al mi helpon kun fotado, sed ankaŭ ŝi ne sukcesis fari belan foton. La vitro reflektis la sunon kaj arbojn, plie mia fotilo apenaŭ similis al tiuj, kiujn ŝi kutimis. Post la lasta kalvaria stacio, kie ni draste „toboganis“ malsupren, ni ekvidis kapelon kun akvo-fonto. Staris tie tiel longa atendovico, ke ni decidis veni por la akvo alifoje. Direkte de la Lurda groto sonis kantoj de la pilgrimantoj.



Kristo falas sub la kruco

Vespere ankaŭ ni volis iri tien, sed posttagmeze la esperantistoj havis du aliajn eblojn: viziti Bratislavon aŭ iri observi, kiel kreskas Marianka. Mi iris admiri la kreskadon.



Novaj dometoj

La modela dometo, kiun oni proponis por rigardi, estis ŝlosita kaj neniu el nia grupo emis telefoni al tie indikita numero. Sekve ni nur promenis tra novaj stratoj. Mia impresio estis, ke la homoj klopodas montri al la najbaro, ke ili havas rimedojn por konstrui pli interesan domon. Mi supozas, ke plej multe admirata estas tiu loĝanto, kiu konstruigis por si vitran barilon.

La eperantistoj kunvenis ĉe la vespermanĝo. Venis ankaŭ Ilonjo el Hungario, kiu plezure kaj bele kantas. Por kantigi ankaŭ la ceterajn, ŝi alportis ruĝan vinon. La sabata tago finiĝis per diservo ĉe la Lurda groto kaj rozario en moderna klostra kapelo kun peto por D-ro Max Kaŝparŭ, kies predikon ni atendis kun plezuro, sed vane – li subite malsaniĝis. Tamen la kantado okazis, espereble Ilonjo kontentis.

La renkonto daŭris ankaŭ dimanĉe, sed la venintoj de malproksime devis pli frue forvojaĝi. Domaĝe, ke ni ne aŭdis la prelegon de Pavol Petrik pri la 1150-a datreveno de alveno de sanktaj Cirilo kaj Metodo.

Zdena Novotná

Ne plu veturas la trajno Esperanto en Pollando

Ekde dimanĉo 2013-06-09 ne plu ekzistas la trajno Esperanto, veturinta inter la urbo Białystok kaj la stacidomo Zachodnia en Varsovio. Post 3,5 jaroj da veturado ĝi estis ĉesigita, ĉar laŭ la Fervoja Oficejo per tiu ĉi trajno veturadis tro malmulte da pasaĝeroj.

Laŭ RET-INFO

Kortuŝa renkontiĝo

Ekde la 17-a ĝis la 20-a de majo mi partoprenis la Germanan Esperanto-kongreson en Nurenbergo. La programo estis riĉa, la etoso amika, kaj ĉefprelegoj de Humphrey Tonkin kaj Martin Haase brilaj, sed ankaŭ la ceteraj programeroj estis interesaj. Ĉio glate iris, nur la veteron por la dimanĉaj posttagmezaj ekskursoj oni estus povinta mendi pli agrabla.

Sed mi nun ne volas raporti pri la kongreso, sed disdividi mian ĝojon kun la legantoj de Starto pri neatendita renkontiĝo – mallonga, tamen kortuŝa – kun unu el miaj Esperanto-amikinoj jam ekde miaj plej fruaj Esperanto-jaroj, nome sinjorino Elfriede Kruse, kiu ĉi-marte festis sian 99-jariĝon.



Foto: Milada Broumová

Mi ekĝojegis vidante ŝin kaj eĉ pli, kiam mi post la saluto eksciis, ke ŝi, kvankam sur rulseĝo, ankoraŭ nun en sia aĝo povas bone babili kaj ŝia cerbo mirige funkcias. Ni rememoris al ni kelkajn niajn komunajn travivaĵojn. Ekzemple kiel en iu fervojista ren-

kontiĝo en Česká Třebová subite subenfalis ŝirmilo de surplafona lampo rekte al la kapo de Elfriede – ni tiam ekkriis pro ŝoko, sed ŝi trankvile diris „Ne zorgu pri mi, mi estas durkapa“. Aŭ kiel ni komune kun nia komuna amiko István Gulyás esploris dum la UK en la jaro 1990 la noktan vivon de Havana.

Ĉar Elfriede havas amikojn inter multaj ĉeĥaj esperantistoj, precipe inter fervojistoj, mi decidiĝis publike rememorigi ŝin kaj deziri al ŝi tiu-maniere laŭeble firman sanon, perfektan solenaĵon okaze de la venontjara centjariĝo kaj multajn ĝojojn kaj pozitivajojn dum ankoraŭ pluraj jaroj.

Petro Chrdle

Tonkin pri estonteco de Esperanto

En la Germana Esperanto-Kongreso en Nurenbergo (17.-20.5.2013) la ĉefa parolanto estis prof. H. Tonkin. Li diris, ke nun ne estas ĉefa problemo interkompreniĝo, sed lingva egaleco. Ke oni povas eliri el la domo kaj post kelkaj sekundoj aŭdos la anglan, oni povas traveturi la tutan mondon kaj eĉ ne aŭdi la vorton Esperanto. Ke la angla ĉirkaŭas la gejunulojn en la lernejo, en la interreto, en populara muziko, tial ili lernas ne lernante, nur aŭtomate. Ne efikas proponi Esperanton kiel alternativon al la angla, ke ĝi alportos en la mondon novan harmonion, ke la aŭtoro estis geniulo k.s.

<http://www.youtube.com/watch?v=loEVZ5wDUgs>

Skokovy – printempe 2013

Post longa vintro kun veno de suna vetero okazis la 37-a seminario en Ĉeĥa Paradizo en la pensiono Espero en la vilaĝeto Skokovy de la 15-a ĝis la 21-a de aprilo 2013.

Venis homoj el diversaj partoj de Ĉeĥio kaj ankaŭ unu svedo. La seminario estis kunigita kun „Sabla printempo“, kiu okazis en fino de la semajno. Kelkaj partoprenantoj venis nur por kelkaj tagoj kaj estis ankaŭ tiaj, kiuj venis nur por kelkaj horoj. Entute venis 37 homoj, inkluzive de Pepino – agrabla dekonujara knabo, ŝajne ĝuanta nian medion.

Ĉiutage matene okazis gimnastikado, post matenmanĝo instruado en du grupoj, post tagmanĝo ekskursoj en la naturon, vizito de la urbodomo kaj ekspozicio pri genealogio. Vesperaj filmoj kaj prelegoj temis pri libro „Bona Espero“, UK en Vjetnamio, pri Islando, pri Svedio, pri „skokova avino“. Lastaj tri tagoj estis dediĉitaj al instruado de registrado de paroladoj kaj kantoj kun tri instruistoj. Multe ni kantis kun gitaro. Dum lasta vespero venis kunkanti neesperantistoj el la pensiono.

Jam nun vi povas aliĝi por aŭtuna seminario de la 16-a ĝis la 22-a de septembro 2013.

Prezo 420,- CZK tage por tranokto + 3 manĝoj kaj 200,- CZK por programotizo. Eblas ankaŭ partopreno por neplena semajno!

Info kaj aliĝiloj: J. Drahotová Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav, tel. 720 652 320, drahotova@esperanto.cz

Perspektivoj de la Eŭropa Ideo

Sub tiu titolo prelegis la 22-an de februaro 2013 la germana ŝtatprezidanto Joachim Gauck en la berlina kastelo Bellevue pri la estonteco de Eŭropa Unio. Laŭ lia opinio mankas komuna Eŭropa ideo-krea rakonto, kiu farus el 500 milionoj da eŭropanoj unu popolon, kaj ankaŭ komuna eŭropa lingvo, t.n. *Lingua franca*, per kiu tiu popolo povus komuniki vojaĝante kaj komercante interne de EU. Li kredas, ke tia komuna lingvo fariĝos la angla.

Per malferma protesta letero reagis s-ro Reinhard Haupenthal (kiu ankaŭ esperantigis la paroladon) atentigante pri ebloj, kiujn proponas Esperanto kiel pli bona solvo. La ĉeĥa traduko aperis ĉe <http://miroslavhruska.blog.idnes.cz/c/323237/Otevreny-dopis-prezidentu-Nemecka-Joachimu-Gauckovi.html>.

Eŭroskeptika artisto en Bruselo

La 27-an de majo 2013 elsendis Ĉeĥa Televido dum sia ĉefa vespera informa programo (Události) koncizan raporton pri nova ekspozicio en Bruselo, kiun ĝia aŭtoro Thomas Bellinck, nomis „Muzeo de Eŭropa Unio“. Li prognozas, ke post kvindek jaroj EU disfalos. Sur la paneloj estis klare videblaj esperantlingvaj surskriboj, kvankam la televida raportanto Esperanton tute ne menciis. La raporton eblas spekti ĉe la adreso (44-a minuto):

<http://www.ceskatelevize.cz/ivysilani/1097181328-udalosti/>

La retejo Libera Folio alportas intervjuon kun la artisto sub la titololo „Mi volis igi tuŝebla tion, kion ni riskas perdi“.



JUBILEA SOLENAĴO

27-29.9.2013 en Svitavy

Omaĝe al 5 jaroj
de Esperanto-Muzeo
kaj 80 jaroj de Esperanto en Svitavy

PROGRAMO

Vendrede 27.9.

17:00 Prelego de Ján Vajs pri Antarktido, 18:45 Vespermanĝo
20:00 La lasta prezento de R.U.R. de K.Čapek (en la teatro TRÁM)

Sabate 28.9.

9:00 Solena inaŭguro kaj 80 jaroj de Esperanto en Svitavy
11:00 Senvualigo de memorŝtono, promeno 12:00 tagmanĝo
13:30 Sanktvenceslaa vingustumado sur la ĉefplaco
14:30 Impresoj el vojaĝo al UKo en Islando
16:00 Inaŭguro de la fotoekspozicio de J. Vajs
"Montpintoj de Eŭropo" en la Urba Muzeo
18:00 Vespermanĝo , 19:30 Dancvespero kun tombolo

Dimanĉe 29.9.

8:30-10:00 Programo omaĝe al jubileo de Esperanto-muzeo
10:15 Lingvokleriga seminario
11:30 Adiaŭo, disiro al trajnoj
10:15 Alternative duontaga ekskurso al la kastelo Litomyšl

TRANOKTO:

en studenthejmo (komfortaj 2-3litaj ĉambroj kun duŝejo/necesejo komuna
por 2 ĉambroj) - 200,- CZK popersono kaj ponokte,
sen matenmanĝo; garantiatas nur post aliĝo kaj pago ĝis 31.8.2013
hotelo/pensiono mendeblas laŭ interkonsento

PROGRAMKOTIZO: 100,- CZK (por membroj de ĈEA, ĈEJ,
SKEF kaj SKEJ), 150,- CZK (pro la ceteraj)

MANĜOJ: antaŭmendeblas kaj pagotas memstare surloke

PAGOJ: kontonumero 2200199009/2010 + variebla simbolo
el via naskiĝdato (ekz. 21.5.1968=21051968)

ALIĜOJ KAJ PLIAJ INFORMOJ:

Esperanto-Muzeo, nám. Míru 81/1, CZ-568 02 Svitavy,
svitavy@esperanto.cz

www.esperanto.webz.cz, tel. (+420) 604377616

Bartošovice



Karaj amikoj, proksimiĝas la tempo, kiam vi povos partopreni la 2-an Internacian Esperanto-Lernejon en la kastelo Bartošovice. La kastelo troviĝas nur 60 km de landlimo inter Ĉeĥio kaj Slovakio, 20 km de Ostrava, 6 km de internacia flughaveno Ostrava-Mošnov kaj 4 km de grava trajna nodo Studénka. La kastelo mem troviĝas en la Natura Rezervejo Poodří, kies centra oficejo situas ĝuste en Studénka. La okazaĵon vi povos partopreni inter la 16-a kaj 20-a de oktobro 2013.

Eblas malmultekoste manĝi en la kastela manĝejo (matenmanĝo 40 Kč, tagmanĝo 80 Kč kaj vespermanĝo 70 Kč). Vi povas tranokti en la kastelo mem (prezo por unu nokto estas 300 Kč) aŭ en privata loĝejo (prezo por unu nokto estas 300 Kč) aŭ en gimastika halo (prezo por unu nokto estas 90 Kč), kiuj troviĝas nur 100 m de la kastelo. Por loĝigo en la gimnastika halo vi devas kunporti propran dormosakon kaj dormi sur la planko.

Kursoj de Esperanto okazos en proksima elementa lernejo nur 100 m de la kastelo. Klasĉambroj estas ekipitaj per la plej modernaj teknikaj rimedoj por edukado. La kursoj daŭros po 4 horoj tage en 2 aŭ 3 klasĉambroj laŭ niveloj de Esperanto-instruado. La kursojn gvidos spertaj instruistoj, ekz. Stano Marček aŭ Georgo Handzlik kaj aliaj.



Dum libera tempo vi povos partopreni prelegojn en Esperanto, perpiedan ekskurson al la Natura Rezervejo aŭ al proksima malsanulejo por sovaĝaj birdoj en Bartošovice.

Ni planas fari ankaŭ aŭtobusan ekskurson al vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo de la kastelo, kiujn vi povos elekti: Muzeo Vagonka Studénka, Muzeo Tatra Kopřivnice, Fortikaĵo Štramberk, Hukvaldy – la naskiĝloko de Leoš Janáček kun promeno tra la parko, kie staras statuo de vulpino Bystrouška, en Příbor la naskiĝdomo de Sigmund Freud, mondfama psikiatro, aŭ Fulnek, kie vivis kaj instruis Jan Amos Komenský – nur 8 km malproksime). Atendebla prezo de la ekskurso estas 120 Kč.

Vespere okazos ĉiam amuzaj programeroj, koncertoj, filmaj prezentadoj en la lingvo Esperanto. Ekzemple koncertoj de Anjo Amika el Budapeŝto, Georgo Handzlik el Pollando aŭ nova bona ĉeĥa muzikgrupo, kiu komencas kanti en Esperanto. Unu vespero estos dediĉita al Brazilo kun karnavalo en la kastelo, prelegoj kaj filmoj pri Brazilo. Partoprenos ankaŭ profesiaj dancistoj. La vesperon finance subtenos mondfama firmao FORD.



Do, por ke ĉiujn planitajn programerojn ni povu kune ĝui, ni atendas vian viziton kaj partoprenon.

Ĉiuj gravaj informoj kaj aliĝilo troviĝas en la paĝo

www.verdastacio.wix.com/lernejo

Aŭ vi povas aliĝi rekte per via mesaĝo al verdastacio@gmail.com

Organiza teamo de IEL 2013 en la kastelo Bartošovice



LA 7-A POSTFERIA RENKOTIĜO 7.9.2013 en Vodňany

- * promeno tra la urbaj vidindaĵoj
- * kultura programo de la Historia urba solenaĵo
- * komuna tagmanĝo kun lingvokleriga programo
- * senpaga vizito de la Urba muzeo kaj galerio
- * paralele promeno al la fiŝlagaj digoj kaj konversacio en la sukeraĵejo

Pliaj informoj kaj aliĝiloj:

pisek@esperanto.cz

Greziljono

La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj: somera programo (semajnoj turisma, artamatora, alternativa, infana, teatra), aŭtuna feriado oktobrofine kaj al jarfina festego kun novjara festeno.

Vidu detalon rete en

www.gresillon.org/somero aŭ
gresillon.org/agendo

Kontaktu nin telefone al +33-2.41.89.10.34 aŭ retletere al kastelo@gresillon.org aŭ letere al MCE Gresillon, St.Martin d'Arce, 49150 Bauge en Anjou, France.

45-a LANDA AMIKA FERVOJISTA ESPERANTO-RENKONTIĜO VÁC, 05. - 07. 07. 2013.

La DANUBKURBIĜA Esperanta grupo – la organizanto – en la urbo Vác kore invitas kaj atendas ĉiujn interesatojn. Interkona vespero, botanika ĝardeno, busekskursoj, konferenco.

bakszapal48@gmail.com

Přihláška na konferenci ČES (Nymburk 25. - 28. 10. 2013)

Přihlášku vyplňte a zašlete poštou na
Ing. Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice,
či **vyplňte elektronicky** na www.esperanto.cz/aligxilo2013
a adresujte k rukám pokladníka ČES mailem na vhirsx@email.cz.

Úhradu provedte na účet ČES:

- FIO BANKA, číslo účtu 2800186228/2010

Jako variabilní symbol uveďte číslo vaší svazové legitimace či čísla, která jste tam uvedli!

příjmení: titul:
jméno: číslo legitimace ČES:
(nečlenové napište 5 čísel=variabilní symbol)
adresa
ulice:
PSČ místo
e-mail: telefon
číslo občanského průkazu: vegetarián: ANO / NE
(povinný údaj pro ubytování) (pro stravující se)
Souhlasím se zveřejněním základních údajů z přihlášky v konfer. materiálech: ANO / NE

chci ubytovat s:
(vepište 1-2 osoby)
Standardní zajištěné ubytování je ve dvojicích na pokojí!
Pouze v případě vyplněných 2 spolubydlících zajistíme 3-lůžkový pokoj.
Nebude-li spolubydlící napsán, seřadíme přihlášené po dvou do pokojů dle pohlaví a věku!

Přihlašuji se na **konferenci Českého esperantského svazu v Nymburku**,
objednávám a zavazuji se uhradit (vyznačte křížkem):

Základní účastnický poplatek	<input type="checkbox"/>	300 Kč
Zvýhodněný účastnický poplatek pro členy ČES přihlášené do 15.9.2013	<input type="checkbox"/>	200 Kč
Zvýhodněný účastnický poplatek pro členy ČES přihlášené po 15.9.2013	<input type="checkbox"/>	250 Kč
Čestný člen ČES, nevidomý člen ČES	<input type="checkbox"/>	0 Kč
Jako student do 26 let žádám o slevu 50 % z účastnického poplatku	<input type="checkbox"/>	
Polodenní výlet autobusem na zámek Loučeň (v neděli odpoledne - doprava + vstupné) pouze prvních 45 osob	<input type="checkbox"/>	jen zámek 220 Kč zámek+labyrintárium 270 Kč
Jako student do 26 let či senior nad 65 let žádám o slevu 50 Kč z ceny výletu	<input type="checkbox"/>	http://www.zamekloucen.c

a současně objednávám **zvýhodněný kompletní balíček** :

V Domově mládeže a hotelu SOŠ a SOU Nymburk		http://www.copnb.cz/cz/s_luzby.php?page=15
3 noci v 2-lůžkovém pokoji a WC/sprchami pro 2 pokoje + strava od páteční večere do pondělního oběda)	<input type="checkbox"/>	1.350 Kč
Žádám 1-lůžkový pokoj za příplatek 420 Kč celkem	<input type="checkbox"/>	Je k dispozici jen omezený počet

Dřívější přihlášení získají nocleh v části zvané hotel Garni (2 nejvyšší patra budovy).

3-lůžkové pokoje jsou pouze v nižších patrech budovy.

Objednávám jen jednotlivé bytovací a stravovací služby (označte křížkem):

Pozn.: Všichni, kteří již objednali „balíček,“ **nevyplňujte** službu podruhé!

Je třeba objednat vždy minimálně 2 noci

(pátek znamená nocleh z pátku na sobotu atd.)

Služba	Cena	Pátek	Sobota	Neděle	Pondělí
Žádám 1-lůžkový pokoj za příplatek 140 Kč/noc	<input type="checkbox"/>				
Nocleh ve 2-lůžkových pokojích	280 Kč/noc	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	
Snídaně	po 50 Kč		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
Oběd	po 80 Kč		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
Večere	po 75 Kč	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	
členský příspěvek ČES na rok 2013	Kč			Kategorie	
členský příspěvek ČES na rok 2014	Kč			Kategorie	
dobrovolný příspěvek pro ČES	Kč				

Příplatek za přihlášku po 15. 10. 2013	<input type="checkbox"/>	100 Kč
Příplatek za platbu na místě	<input type="checkbox"/>	100 Kč
Přihlášky na místě jsou však bez záruky!		

<p>Celkem jsem uhradil dne (kontrolu či přepočítání provede pokladník ČES, který přihlášku také obratem potvrdí)</p>	<p>..... Kč</p>
---	-----------------

Současně platím také za

Mou platbu provedl(a) ve společné platbě

V dne2013

podpis (pro přihlášku poštou)

V případě odhlášení se účastnický poplatek nevrací!

Přihláška je platná pouze po zaplacení

Odhlášení po 20.10. se bude řešit individuálně a poplatky zahrnou již nezrušitelné služby

ĈEA-KONFERENCO EN NYMBURK (25.-28.10.2013) – DUA INFORMILO

Estimataj gesamideanoj,




proksimiĝas la plej grava ĉiujara aranĝo de ĈEA, al kiu mi volus vin ĉiujn elkore inviti. Ĝi ja devus prezenti ne nur kio lastjare okazis, kiujn aktivecojn ni faris, sed ankaŭ doni al vi ŝancon ion ellerni, pridiskuti aktualajn aferojn kaj komune pripensi strategion por venonta periodo. Nur multnombra kaj reprezenta partopreno ebligos plenumi tiun celon. La partopreno memkompreneble ne estas devo, sed konferenco/kongreso vere devus servi kiel pinta amika renkontiĝo de ĉeĥaj esperantistoj kaj mi firme kredas, ke ĝi estos.

Denove ni havas ŝancon renkontiĝi dank' al la festotago por 4 tagoj (de vendredo ĝis lundo), kio ebligos proporcie dividi programon kaj ne nur supraĵe hasti. Oni planas kutimajn programerojn ekde raportoj de la estraro kaj de kluboj kaj sekcioj, diskutforumo, urbotrarigardo ĝis tutvespera balo en granda salono kun muzikisto. Sendube okazos renkontiĝoj de aktivaj grupetoj kiel ekz. pri ciferecigado, voĉregistrado aŭ lingvoinstruado kaj vi povos partopreni por ekscii pli kaj eventuale engaĝiĝi.



Komune enkadre de la konferenco necesos elekti 3-membran balotkomisionon kaj decidi inter eblaj variantoj por loĝi kaj kunsidi en Prostějov dum la kongreso 2014.

Multon pri la programo inkl. de ekskursoj vi povas relegi en la antaŭa numero de Starto 2013/1 kaj mi ne volas ripeti jam skribitan. Tamen permesu al mi ankoraŭ kelkajn personajn impresojn de nia (mi kun mia edzino Pavla kaj la loka ĈEA-membrino J. Dubinová) esplorvojaĝo en Nymburk.



Ni koncentriĝis unue pri la **konferencejo** kaj necesas diri, ke kvalito de la ĉambroj estas pli bona ol en pasintaj jaroj, ĉar la loko servas ne nur kiel internulejo, sed parto ankaŭ kiel turisma hotelo. Ni okupos plej suprajn etaĝojn kaj facilan transporton ebligos du sufiĉe grandaj liftoj. La ĉambroj havas balkonon, el kiu oni vidas la tutan ĉirkaŭaĵon. Plej probable ni tie estos solaj, kio donus al ni trankvilon. Al la unuaj aliĝintoj ni garantias rezervadon en la hotela plej supra parto.

Krome ni aranĝis en la kontrakto, ke oni loĝos en la ĉela sistemo nur duope sendepende ĉu temas pri 2 aŭ 3-lita ĉambro. Se tamen iuj volus kun siaj geamikoj loĝi triope, sufiĉas tion nur noti sur la apuda aliĝilo kaj ni facile plenumos tion. Ni disponas pri kelkaj 1-litaj eblecoj, sed mi petas vin postuli ilin nur en vere necesaj kazoj.

Kiel pasintjare eblas kontraŭ pli avantaĝa prezo aliĝi al kompleta pakaĵo por manĝi kaj loĝi per nurnura unu klako aŭ streko sen plenigi unuopajn servojn.

Ni ankaŭ estis kontentaj pri ejoj, kie ni kunsidos. Je nia dispono estos granda salono kun ĉiuj ekipaĵoj, ĉambro por 30 personoj, manĝejo kaj ankaŭ aliaj etaj spacoj, kie malgrandaj laborgrupetoj trovos taŭgan medion por trakti.

Nelastvice grave estas, ke distanco al trajna kaj busa stacidomoj estas nur ĉirkaŭ 300 metroj.

La urbeto mem agrablas por promenado. Tra ĝiaj vidindaĵoj plej supozeble gvidos vin la vicurbestro mem. Krom la unika muregaro kun najbara parko vi povas ĝojatendi pliajn interesajn lokojn. Naturamantoj povos observi eĉ naĝantajn ondatrojn!



preĝejo – urbodomo – turka turo – statuo de B. Hrabal

Ni esploris por vi ankaŭ nian ekskursocelon – privatan kastelon **LOUČEŇ**, al multaj turistoj ankoraŭ nekonatan. La interno, tra kiu akompanis nin ĉiĉeronino en historia robo, estas vere tre elegante, bunte kaj riĉe ekipita kaj donas la hejmecon impreson, ke ĝi estas daŭre loĝata. Kompare al la aliaj kasteloj vi eĉ rajtas plurloke sidiĝi al la brakseĝoj kaj eĉ fotiĝi tie. Anstataŭ sekaj historiaj faktoj vi povas ekscii interesajn pri la vivo de la originaj posedantoj, la nobela familio Thurn-Taxis (i.a. ankaŭ pri taksio kaj poŝtservoj, sportado k.a.). Do malgraŭ relative alta enirprezo la kastelo sendube indas la viziton! Pro tempomanko ni ne sukcesis trarigardi parkon kun unika aro de 11 labirintoj (la plej granda en Eŭropo), kiun eblos viziti por rabatita prezo. Tiuj, kiuj ne tiom ŝatos plu marŝi, elektos varianton sole kun kastelo kaj poste povos libere promenetati aŭ viziti lokan sukeraĵejon ktp. Kun la urbo Nymburk kaj la kastelo Loučeň vi povas konatiĝi surfote en nia nova Fotogalerio en

<http://muzeum.esperanto.cz>.

Krome mi povas konfirmi, ke la urb-estro de Nymburk s-ro Inĝ. Miloš Petera transprenis oficialan aŭspicion super nia konferenco kaj ke li oficiale ĝin malfermos sabate matene per enkondukaj vortoj. Ĉi-loke mi volas mencii kaj precipe danki en la nomo de ĉiuj ĈEA-membroj al la urbestro de Nymburk, sed ankaŭ al la lokaj unuopuloj, konkrete s-ro Vít Bělohorský (www.kouzelný-svet.cz), CHRTEK OPTIK s.r.o., Palackého 124, Nymburk (<http://www.chrtekoptik.cz/>), kaj s-ro M. Košnar, kiuj per siaj donacoj helpas al ni okazigi sukcesan konferencon. Nomojn de ĉiuj donacintoj kaj nian dankon vi poste povos trovi ankaŭ sur nia retpaĝaro pri la konferenco kaj sekve en konferencaj materialoj.



Mi forte esperas vian partoprenon kaj deziras ĉion bonan. Sendube helpas al ni via frua aliĝo sen atendi la lastan limdaton aŭ detalajn precizigajn informojn aperontaj en Starto 2013/3. Sur paĝoj 47-48 vi povas rigardi kompletan aliĝilon. Ĉiuj, kiuj utiligas komputilon, povas trovi ankaŭ retpoŝte sendeblan aliĝilon en „amikema“ formato (kaj ĉeĥlingve, kaj esperantlingve) en la rubriko Akce (Aranĝoj) de www.esperanto.cz.

Vladimír Dvořák, ĈEA-prezidanto

Nymburk

Nymburk estas distrikta urbo kun 14.633 loĝantoj (2000). Ĝi estis fondita ĉirkaŭ la jaro 1275 de ĉeĥa reĝo „fera kaj ora“ Přemysl Otakar la 2-a kaj dum tuta mezepoko ĝi apartenis al gravaj urboj en la lando, havante multe da privilegioj. Per siaj fortikaĵoj kaj akvaj fosaĵoj ĝi estis fama kiel „citadelo sur la rivero Elbo“ kaj apogo de reĝa potenco. Grava estis rivera vadejo.

Pri komencoj de homa prisetlado de ĉi tiu loko atestas pratempaj unikaj tumuloj, arkeologie datitaj 3600 jarojn antaŭ Kristo.

La urbo kreskis kaj riĉiĝis ĝis la tridekjara milito (1618-1648). Dum ĝi la urbo estis bruligita, detruita, la fortikaĵoj disrompitaj. La vivo nur malrapide revenis. Pozitiva ŝanĝo estis fondo de la fervojo en la jaro 1870. De tiu tempo la urbo denove konstante kreskas, oni konstruis fabrikojn, lernejojn, publikajn konstruaĵojn, firmigis bordojn de la rivero kaj konstruis novan ponton kaj akvoenergian centralon kun naviga kluzo (komence de la 20-a jarcento).


Nuna Nymburk estas moderna centro de la meza Elba baseno, urbo de kulturo, verdaĵo, sporto kaj de multaj historiaj memorindaĵoj. Vidindaj estas preĝejo de sankta Egidio, kapelo de Johano Nepomuka, renesanca urbodomo, maltejo, pesta kolono, eksa akvoturo „Turka turo“ k.a..

En Nymburk havas memortabulon esperantisto Josef Šilhart (1876-1958), vivis tie verkisto Bohumil Hrabal (1914-1997) kaj baroka komponisto Bohuslav Matěj Černohorský (1684-1742).

laŭ Vikipedio


Novaj eldonaĵoj de KAVA-PECH en Esperanto

Helfricht Jürgen: **La Dresdena Sinjorina preĝejo. Kroniko de la jaro 1000 ĝis hodiaŭ.** Historio de la probable plej fama barokstila katedralo (germane: Frauenkirche) de ĝia ekesto tra kompleta neniigo dum la aeratako de Dresdeno fine de la dua



mondmilito ĝis hodiaŭ. Krom ni-grablankaj fotoj ĝi enhavas ankaŭ 8 plenkolorajn. El la germana originalo ĝin esperantigis Benoît Philippe. Solide bindita, 86 paĝoj.

Petr Chrdle: **Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj** La tria, aktualigita kaj kompletigita eldono (la unua ilustrita) de la verko, kiu jam longe estas elĉerpita. En ĝi la



aŭtoro resumas siajn spertojn kolektitajn dum la internacia profesia agado plejparte (sed ne nur) en la branĉoj de turismo kaj eldonado de libroj. La ĉefaj ĉapitroj jenas: Enkonduko; Kvar rilatoj dum la profesia uzo de Esperanto; Entreprenista mora-

lo; Jura flanko de la uzado de Esperanto por profesiaj celoj; Ekzemploj de kelkaj profesiaj aplikoj de Esperanto; Lingva flanko; Kiel pligrandigi la Esperanto-merkaton; Konkludo. 98 paĝoj.

Esperantologio, n-ro 6 / Esperanto studies, No 6. La 6-a numero en la vico de almanaĥoj por esperantologoj, redaktita de Christer Kiselman. Ĝi enhavas originajn studojn pri lingvistikaj, historiaj, literaturaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj el la plumo de elstaraj esperantologoj. En ĉi tiu numero estas en Esperanto la artikoloj „Radikoj kaj vortoj en Esperanto“ de Wim Jansen, „Malpliigi pretervidojn kaj misavertojn de esperanta literumilo per eraromodelo“ de Edmund Grimley Evans kaj „La pola kulturo en la tempo de Ludoviko Zamenhof“ de Bogusław Dopard kaj Sabina Bobran, kaj en la angla (kun resumoj en Esperanto) „Lerneblo de la refleksivo en Esperanto“ de Wim Jansen, „Transpiranto: ĉu antisemitismo, ksenofobio aŭ nur ŝerco?“ de Leif Nordenstorm kaj „Fontoj de tekstoj por korpusoj de esperanto“ de Vilius Normantas. La libro havas 132 paĝojn kaj ĝi estas legebla ankaŭ rete, same kiel la antaŭaj numeroj ĉe www2.math.uu.se/esperanto.

Krome, KAVA-PECH eldonis lastatempe du librojn kunlabore kun aliaj eldonejoj, nome:

Leif Nordenstorn: **Arne, la ĉefido** kun Eldona Societo Esperanto (ESE) Stockholm. La dua eldono de la libro, kiu en 2006 gajnis en la konkurso de UEA „Infanlibro de la jaro“. Temas pri tre interesa aventuro de du knaboj el la vikinga tempo, kiam venis en Skandinavion la unuaj kristanaj misiistoj. 112 paĝoj. Momente estas preparata ĉeĥa eldono en traduko de Oldřich Arnošt Fischer.

Litera scripta manet (redaktita de Věra Barandovská-Frank) kun Institut für Kybernetik Paderborn. Festlibro okaze de okdekjariĝo de prof. d-ro Helmar Frank, la plej renoma fakulo en la branĉo kibernetika pedagogio, fondinto kaj multjara prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Ĉiuj kontribuoj de sesdeko da aŭtoroj estas dulingvaj, en etnolingvo kaj en Esperanto. 728 paĝoj, solide bindita.

Kaj interesaĵo por tiuj, kiuj scias la francan: Ni eldonis kunlabore kun la tradukistino Ginette Martin francan version de la fama romano de aŭstralia verkisto Trevor Steele „Comme un Vol d'Oiseaux Sacrés“, kiu aperis unue en Esperanto kiel „Flugi kun kakatuoj“, nur poste en la angla. La romano priskribas la koloniadon de Okcidenta Aŭstralio fare de blankaj setlantoj, kiuj ignoras la rajtojn de la aborigenoj kaj kruele forpelas ilin de ilia tradicia teritorio.

Ĉe www.kava-pech.cz vi trovos pli da detaloj. La prezoj, pro malaltaj eldonkvantoj, estas relative altaj, sed la

eldonejo proponas al la ĈEA-membroj rabatojn. Por ekscii ilin necesas serĉi en la ĉeĥlingva versio de la retpaĝaro aŭ kontakti la eldonejon (KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice). La rabatitajn prezojn respektas ankaŭ la libroservo de ĈEA, kie eblas mendi preskaŭ ĉiujn esperantlingvajn librojn de KAVA-PECH.

Por konatiĝi kun la libroj tamen ne nepre necesas ilin aĉeti. Same kiel siajn antaŭajn eldonaĵojn en kaj pri Esperanto, la eldonejo donacis po unu ekzemplero al la ĈEA-biblioteko ene de la Esperanto-muzeo en Svitavy, kie do eblas ilin pruntepreni. Krome la muzeo ricevis donace de la eldonejo ESE du librojn, kiujn por ĝi produktis KAVA-PECH laŭmende, nome ĉerman infanlibron „Flugoranĝo rakontas“ kaj literaturan esearon de Sten Johansson „Kroze-proze“, kiu enhavas ankaŭ eseon „Bohemia amoro“ pri la verkaro de Karolo Píĉ kaj Eli Urbanová.

Petro Chrdle

KELI-kongreso en Svitavy

Jam la 63-a kongreso de KELI (Kristana esperantista ligo internacia) okazos 3. – 10. 8. en Svitavy. La temo de la kongreso estas AKVO. Aliĝis ĝis nun esperantistoj el 10 eŭropaj landoj. Restas ankoraŭ kelkaj liberaj litoj kaj partopreni povas ĉiu esperantisto, kiu volas travivi semajnon en kristana medio. Aliĝilojn kaj informojn ĉe Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, reta adreso: polnickypavel@seznam.cz tel. 311 241 406 (vespere).

KOMENIUS - ZAMENHOF

La Vojo al Harmonio

Jaroslav Karhan (daŭrigo)

La kaoso kaj labirinto en homaj rilatoj esence fontas el tio, ke homoj forlasas unu necesajon kaj akceptas nebezonaĵojn, kiuj estas:

1. multe da regantoj,
2. multe da leĝoj,
3. multe da juristoj, kiuj erarigas la publikajn juĝistarojn,
4. multe da eksteraj ceremonioj, kiuj ombrigas la veran substancon de aferoj,
5. malestimo al leĝoj kaj ilia malrespektado,
6. publika rivaleco de regantoj,
7. milito kaj besta furiozeco.

Tial ni rezignu pri tiuj ĉi nebezonaĵoj kaj kulturu la ununecesan – la konkordon!»

* * *

J. A. Komenius en septembro 1669 grave malsaniĝis kaj en septembro 1670 prizorgis, ke liaj amikoj – post lia morto – daŭrigu eldonadon de liaj verkoj.

Kortuŝe li dankis al Dio, ke tiu ĉi – tra la labirinto de la mondo – tamen alkondukis lin al si: «Mia tuta vivo estis migrado, mi ne havis patrujon; neniam kaj nenie mi havis daŭran hejmon. Sed nune mi vidas mian patrujon ĉielan...»

En oktobro 1670 ekestis plua malsanatako kaj 15.11.1670 li mortis en la nederlanda ĉefurbo Amsterdamo. Entombigo okazis la 22.11.1670 en preĝejo de la proksima urbo Naarden.

J. A. Komenius estis viro de doloro, kredo, amo; teologo, filozofo, verkisto, reformanto, pedagogo.

Liaj vivsuferoj komenciĝis jam en lia 12-a jaro, per morto de gepatroj kaj daŭris per bruligo de la urbo Strážnice en 1605 – kie li trovis anstataŭan hejmon – ĝis suferado, kaŭze de kontraŭreformaciaj fortoj, tra mizeroplena migrado en fremdaj landoj, bruligo de Leszno, inkluzive lian dometon – en 1656 – ĝis la trankvila tombo en la nederlanda urbo Naarden.

Ĉiutage ekzistadis zorgoj pri la disigitaj religiaj fratoj, doloroj el la homa nesaĝeco, seniluziiĝo de homoj, kelkfoja perdo de havaĵo, familianoj, amikoj kaj verkoj, pri kiuj li laboris grandan parton de sia vivo. Vere, la ŝarĝo, kiun li portis, estis ege peza kaj dolorplena...

Tamen li ne malesperis. Alte super la labirinto de la mondo, tra kiu li migris, li trovadis en paradizo de sia koro Dion, en kiu li migris, en kiu li havis konstantan rifuĝejon kaj forton. Lia kredo estis traekzamenita per fajro de doloroj...

Li amis infanon, ĉar en ĝi li vidis kaj lernis vidi animon vivan, kreaĵon kaj bildon de Dio, partoprenonton de la Dia regno. Li invitadis ĝin al la Centro de sekureco – Dio – kaj sur la vojon de lumo, harmonio kaj paco.

Lia teologio estis simpla kaj unueca: li akcentadis la bazajn leĝojn de Dio, laŭ kiuj li ĝiskonsekvence vivis. Alie li ne estis povanta elteni la ŝarĝon, metitan sur lin.

Li meditadis kaj samtempe ne ĉesis krei. Li mirinde kunigis internecon kun aktiveco. Lia vivo estis plenplenade agado. Li instruadis la homaron al harmonio kaj preparis praktikan vojon por ĝia atingo...

Li estis elstara verkisto. Siajn pensojn li enmetis en pli ol 150 volumojn, el kiuj multaj havas tutmondan gravecon kaj atingis internacian disvastiĝon.

Lia koncepto de reformacio plilarĝiĝis: necesas reformi konstante; ĉiuj vivsferoj devas submetiĝi al bezono de pli bona ordigo. La lernejo, nacia kaj politika vivoj, internaciaj rilatoj, religio – tio ĉio, laŭ alta mezurilo de Diaj postuloj – devas ĉiam esti redonita al origina destino, kiun al ili donis Dio.

Li estis elstara pedagogo de monda signifo kaj tial li estas nomata «Instruisto de nacioj». La filozofo G. W. Leibnitz, post lia morto, diris: «Beata maljunulo, de ĝusta mondo nova konkeranto, ne perdu esperon. La morto trarompas viajn laborojn, sed kion vi fervore semis, en rikoltoriĉo falos teron. Ekstos tempo, ho Komenius, kiam la plej bonaj homoj laŭdegos vin pro tio, kion vi faris, esperis kaj deziris!»

2. VIVMISIO DE L. L. ZAMENHOF

Ludoviko Lazar Zamenhof naskiĝis 15.12.1859 en la urbo Bjalistoko, Pollando, kiel la unua filo de la mezlerneja instruisto de geografio kaj modernaj lingvoj – Marko Zamenhof.

Jam en sia junaĝo li havis amason de eksteraj, tre fortaj impresoj. Lian senteman animon forte influis ŝirvundaj travivaĵoj de tio, kion li vidis en sia naskiĝurbo. Li mem priskribis tion al sia amiko N. Borovko:

«Loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiuj el tiuj ĉi elementoj parolas

apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn.

En tia urbo, pli ol ie, la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn.

Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj... Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon... Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la «grandaĝaj» posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon...» Tiom propraj vortoj de Zamenhof.

Tiel frue estis vivo de Zamenhof trapenetrita per tragiko de rasa malamo. Li serĉis vojon, por ŝirmi la subpremitajn homajn fratojn kaj rebonigi la grandajn sociajn maljustaĵojn. Helpi al ĉiuj, ke ili vivu pli bone – tio estas revo de infano, meditado de junulo kaj ago de plenkreskulo...

Post frekvento de la elementa lernejo en Bjalistoko, li studis en gimnazio en Varsovio. Eksterordinare li interesiĝis pri lingvoj. Jam en sia infanaĝo li sciis paroli ruse, pole kaj hebree. En la gimnazio li ellernis la francan, anglan, germanan, latinan kaj grekan.

Li plezure legadis poemojn de la rusa poeto Nekrasov, kiuj esprimadis sopiron pri liberigo de la popolo. Ankaŭ Zamenhof sentis kun simplaj homoj, precipe malriĉuloj kaj subprematoj. Ĉiuj devas interfratiĝi kaj havi eblon homdigne vivi.

(daŭrigota)

Jubileoj

Antonín Střelba 100 jaroj

La 5-an de julio 2013 ĝisvivis 100-jaran naskiĝtagon aktiva ano de E-klubo en Česká Lípa s-ano Antonín Střelba. Li esperantistiĝis en 1958 kaj de tiu tempo li estas aktiva membro de klubo. De 1.1.2006 li fariĝis prezidanto de la klubo. Helpe de liaj sukcesaj agadoj kun



la urba registraro, nia klubo gajnis eblecon senpage kunvenadi en hejmo por maljunuloj kaj poste en hejmo por azilpetantoj. En lia aĝo li estas vigla klubano kaj partoprenas regule klubajn renkontojn de E-klubo en Česká Lípa, eĉ komunajn renkontojn kun geesperantistoj el Nový Bor. Ni, geanoj de E-klubo en Česká Lípa kune kun geanoj de E-klubo Nový Bor esprimas al s-ano Střelba al lia solena tago niajn sincerajn bondezirojn de ĉio la plej bona, precipe de bona sano ankoraŭ por multaj pluaj jaroj. Geanoj de E-klubo Česká Lípa kaj Nový Bor.

Josef Hron 80 jaroj

La 5-an de junio 1933 naskiĝis honora membro de ĈEA Josef Hron el Pardubice, aktivulo de AEH, aŭtoro de la plej ampleksa ĝis nun vortaro Esperanta-ĉeĥa, atingebla rete ĉe



<http://www.esperanto.wz.cz/>

Intervjuon kun J. Hron legu en Starto 2/2009.

Jan Duda 75 jaroj



Violonisto Jan Duda el Olomouc jam multajn jarojn kontribuas al kulturaj programoj dum niaj asociaj kaj klubaj aranĝoj. Li organizis la 100-jaran kluban jubileon de

EK Olomouc en 2011. Li naskiĝis la 25-an de junio 1938.

La 16-an de junio atingas 70-jariĝon **Josef Kříž** el Ústí nad Labem, fama pro siaj venkoj en konkursoj de ĉina radio. **Vladimír Škoda**, kuracisto el Bučovice, iama komitatano de ĈEA kaj de pedagogia kaj junulara sekcioj, festis 60 jarojn la 10-an de januaro. La saman jubileon atingis la 22-an de majo ankaŭ **Jiří Vyšinka** el Vracov, kiu kun sia edzino zorgas pri la asocia Libroservo, kaj la 24-an de aŭgusto 60-jariĝos ankaŭ **Miloš Bloudek** el Karlovy Vary, loka aktivulo (ekz. en 1993 kunorganizis grandan ĉeĥan-germanan kongreson).

Ni rememoras



Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Augustin Pitlík** (1883-1960) el Prago, honora membro de UEA, membro de Lingva Komitato, sekretario de UK 1921 en Prago, post 1930 sekretario de ĈAE, direktoro de kolegio en Doksy. Li fondis Ĉeĥoslovakian Esperanto-Instituton en 1923 kaj esperantigis eldonaĵojn pri fervojo.

Jubileoj (daŭrigo)

Antaŭ cent jaroj naskiĝis **Zdena Matyková** (1913-2002) el Hradec Králové, kiu esperantigis infanlibrojn Rumcajs kaj Formiko Ferda. Sian 90-jariĝon ne ĝisvivis **Josef Vaněček** (1923-1998), fondinto de AEH, **Jiří Laube** (1923-2009), honora membro de ĈEA, aktivuloj de scienc-teknika sekcio, kaj poetino **Zdenka Bergrová** (1923-2008), amikino de Esperanto. Unu el tradukantoj de ŝiaj versoj al Esperanto, **Jaroslav Mráz** (1933-2005), festus ĉi-jare 80 jarojn.

Antaŭ 30 jaroj forpasis **Libor Křivánek** el Písek (kluba prezidanto, organizanto de ekskursoj), **Dalibor Chalupa** el Praha (kiel dungito de la ĉeĥoslovaka radio kontribuis al Verda Stacio) kaj **Aleš Berka** el Vsetín (eldoninto de malkaraj libroj, Informilo el Vsetín kaj lernolibro kun vortaro kaj legolibro). Antaŭ 10 jaroj mortis Alena Růžičková-Pavlinová el Brno (aktorino, kiu kontribuis al kulturaj programoj), **Jiří Rudolf Zvěřina** el Liberec (eldonis stencilitajn instrumaterialojn kaj adresojn de korespondemuloj) kaj **Jiří Vomáčka** el Plzeň (kiel entreprenisto li sponsoris la lokan klubon).

Preparis M. Malovec kun V. Podhradská

Pri Jiří Karen en la bengala

Probal Dasgupta, lingvisto kaj UEA-prezidanto, verkis bengale artikolon pri Jiří Karen, kiu estas aperonta en 2013 en Kolkata revuo Parikatha, en speciala numero dediĉita al la mondliteraturo.

Jarmila Rýznarová en Almanako Lorenz

En Almanako Lorenz 2013 aperis danko al „veteranino de nia Movado“ Jarmila Rýznarová, kiu verkas por la almanako interesajn artikolojn. Ekz. *Esperanto en la ĉeĥa urbo Pardubice* (2008) aŭ *La vivo plena de muziko* (2012) pri kantistino Vlasta Urbanová.

Max Kašparů profesoro



La 10-an de majo 2013 Max Kašparů akceptis el la manoj de la rektoro de VŠZsP en Bratislava la dekretan de altlerneja profesoro. Nuntempe aperas ankaŭ lia nova ĉeĥlingva libro *Naslouchat je víc než*

poslouchat (Malfermi la orelojn por ies vortoj estas pli ol nur aŭskulti).

Oishi Wasaburo menciita en Ĉeĥa Radio

La 4-an de majo 2013 Ĉeĥa Radio en la kleriga programo Meteor klarigis, kial aviadilo flugas al oriento pli rapide ol al okcidento. La fenomenon, kiu rilatas al rotacio de Tero, malkovris japana sciencisto Oishi Wasaburo jam en la 1930-aj jaroj, sed „kulpe“ de lia entuziasmo por Esperanto, en kiu li verkis siajn malkovrojn (*Observadoj meteorologiaj kaj aerologiaj: faritaj en la Aerologia Observatorio de Tateno en la internaciaj tagoj dum la polusa jaro 1932-33*) la scienca mondo nenion eksciis.

El la kluba vivo

Brno. La 20-an de februaro 2013 la prezidantino de la Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Brno Věra Podhradská baptis eminentan verkon de Josef Cink *Ĉeĥa-esperanta frazeologia vortaro* per glaseto de moravia blanka vino. La libron tenas la editoro Jan Werner kaj la kasistino Bohumila Trzosová. (Z. Závodný)



La 15-an de majo 2013 prelegis en Brno gastoj el Ústí nad Labem, Vlastimil kaj Věra Novobilský, kiuj prezentis la kortuŝan vivon de talenta knabo Petr Ginz, murdita en Aŭŝvico. Li estis filo de esperantistoj Ota kaj Maria Ginz. La verkon *Taglibro de mia frato* (esperantigita de la geedzoj Novobilský) verkis la 13-jara Petr antaŭ transporto al Terezín.



Fotoj O.A. Fischer

Olomouc. La 5-an de aprilo 2013 realiĝis jarkunveno de la esperantista klubo en Olomouc, kiun partoprenis 18 personoj (ankaŭ el Přerov, Šumperk kaj Prostějov)



Přerov. La 20-an de marto 2013 en restoracio Pegas okazis jarkunveno de Esperanto-Klubo Přerov. Partoprenis 21 personoj, ankaŭ el aliaj moraviaj kluboj. La klubo festos sian 90-jariĝon la 7-an de septembro 2013.

(tekstojn kaj fotojn liveris J. Liška)



Bartošovice: la 22-a de februaro 2013 okazis 1-a Lerneja Balo en Bartošovice kaj partoprenis ĝin ankaŭ esperantistoj. En la programo de la balo ni prezentis al ĉiuj gastoj ankaŭ kelkajn kantojn en Esperanto. Kantis Anjo Amika el Hungario kiel honora eksterlanda gasto.

Svitavy. Sabate la 15-an de junio 2013 okazis Infana Esperanto-Tago. Partoprenis 18 infanoj (el Opatovec, Ratiškovice, plej multaj el la pola Rybnik) kaj 9 plenkreskuloj. Post vizito de E-muzeo la



ĉefa programo okazis en la lernejo Riegrova (iama orfejo de Ottendorfer). Instruisto Miroslav Sýkora montris obstaklokurejon kun reprezentanto Daniel Dočkal, unu knabo eĉ provis vetkuri kun li. Lernantino Kristýna, bronza ĉampionino pri pafado, prezentis pafilojn. La geknaboj ludis ankaŭ unihokeon.

Šumperk. Sabate la 18-an de majo 2013 esperantistoj el Šumperk aranĝis en Velké Losiny renkontiĝon, kiun partoprenis 26 personoj. Ili vidis kastelan ĝardenon, solene senvualigis memortabulon sur Esperanto-arbo plantita en 1967. Post vizito de kuracbaneja domaro kaj de saniga fonto ili tagmanĝis en Popola



Restoracio Mrázek, raportis pri siaj kluboj, dancis kaj lotumis tombolon.

Třebíč. La 9-an de marto 2013 okazis kluba jarkunveno, kiu precipe traktis pri la tendaro en Lančov. La nova juna skipo modernigis la retejon <http://set-lancov.cz> – kaj atendas partoprenantojn el la vico de esperantistoj. Infanan grupon la klubo havas en Okříšky.



La klubo proponas ankaŭ librojn, kiujn ĝi eldonis (*Blanka malsano* de Čapek, *Knaboj de Kastora rivero* de Foglar, *Ondro kaj Drako* de Dyk, *Historio kaj biografioj* de Vondroušek, *Gramatiko de Esperanto* de Malovec)

Vítkovice: la 22-an de majo 2013 okazis jam tradicia *Ovofritaĵo* ĉe la fajro en la ĝardeno de J. Suchánek. Kantado kun gitarludo. Vidu:

<http://www.esperantovitkovice.estranky.cz/fotoalbum/nia-klubo/>



KALENDARO 2013



- 2013-06-28/30 Semajnfino en Esperanto- urbo Herzberg
Info: aeh-ikeh@volny.cz
- 2013-07-15/08-09 Somera Esperanto-Tendaro Lančov
Info: let.lancov@seznam.cz
- 2013-07-12/20 Somera Esperanto-Studado Martin
Info: ses@lern.net
- 2013-07-20/27 98-a UK Rejkjaviko
- 2013-08-03/10 KELI-Kongreso en Svitavy,
Info: polnický@quick.cz
- 2013-09-07 La 7-a Postferia Renkontiĝo en Vodňany,
Info: pisek@esperanto.cz
- 2013-09-07 La 90-jariĝo de EK Přerov
Info: tonda.krejcir@seznam.cz
- 2012-09-12/13 Skolta solenaĵo kaj senvualigo de E-Monumento en Kopřivnice
Info: khyvnar@seznam.cz
- 2013-09-16/22 Aŭtuna seminario Skokovy
Info: drahotova@esperanto.cz
- 2013-09-20/22 Arkones, Poznan
Info: tobiasz@esenco.org
- 2013-09-27/29 Jubilea Solenaĵo en Svitavy,
Info: svitavy@esperanto.cz
- 2013-10-16/20 La 2-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice
Info: verdastacio@gmail.com
- 2013-10-25/28 ĈEA-Konferenco en Nymburk,
Info: cea@esperanto.cz
- 2013-11-08/10 Fervoja konferenco en Praha
Info: cefea@centrum.cz
- 2013-11-30 AnkRo en Pisek,
Info: pisek@esperanto.cz
- 2013-12-08 Marcipana Kristnasko Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz



Werner Bormann (1931-2013)

Ni kondolencas

La 5-an de februaro 2013 mortis **Josef Novosad** (92-jara) el Ostrov nad Ohří, kiu priskribis siajn vojaĝojn al UK-oj en pluraj kajeroj (ĉeĥ-lingve).



La 31-an de marto 2013 forpasis **František Patera** (93-jara) el Hořice v Podkrkonoší. En la jaroj 1976-1979 li estis asocia vicprezidanto, inter 1982-1987 membro de la asocia estraro. En Hořice li estis motoro de la loka movado. Li gvidis kurson, kun kiu li vizitis la urbon Erfurt en la tiama GDR, ĉar tie la kursanoj havis siajn unuajn korespondajn kontaktojn. Poste li instigis ilin partopreni en SET Lančov, ekz. Mian filinon Lucka. Li vizitis ankaŭ Japanion kaj pere de Esperanto travojaĝis grandan parton de tiu lando. En 1982 li aranĝis en Hořice ekspozicion de infanpenetraĵoj, ĉ. 700 bildoj el 35 landoj. Li estis severa, postulema homo, sed ankaŭ bona amiko, kolego kaj helpanto.

Stanislav Kareš

FORPISIS D-RO WERNER BORMANN

Werner Bormann, akademiano, doktoro pri ekonomiko kaj unu el la plej gravaj gvidantoj de UEA dum la lastaj jardekoj, forpasis la 16-an de majo 2013 en sia hejmurbo Hamburgo. Li estis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio 1967-1977, de 1971 ĝis 1980 estrarano de UEA; 1974-1977 kiel vicprezidanto kaj 1977-1980 kiel ĝenerala sekretario. Honora Membro de UEA.

Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

RAPORTO PRI PUBLIKA INFORMADO PRI ESPERANTO KADRE DE ĈEA

Kiel ni promesis en la antaŭa numero, ni volas informi vin koncize pri enhavo de la raporto kaj detala dokumentaro, kun kiu Ĉeĥa Esperanto-Asocio gajnis en la ĉi-jara internacia konkurso de la japana fondaĵo CIGNO, destinita por Esperanto-asocioj de membroŝtatoj de Eŭropa Unio en sfero de informado pri Esperanto kaj internacia lingva problemaro.

En la konkursa raporto estis priskribitaj kaj tekste kaj fote dokumentitaj **200** niaj **diversspecaj aktivecoj kaj projektoj**, realigitaj en la jaro 2012:

* 36 artikoloj en regionaj, distriktaj kaj lokaj ĵurnaloj kaj 8 artikoloj en fakaj gazetoj

* 11 radioelsendoj en la tutŝtata Ĉeĥa Radio, 4 artikoloj sur la retejo de Ĉeĥa Radio, 2 regionaj elsendoj kaj 2 ĉeĥlingvaj elsendoj en „Verda Stacio“, 3 riportoj de regionaj televido

* 6 ampleksaj artikoloj pri nia movado en prestiĝa akademia enciklopedio, akirinta premion „Vortaro de la jaro 2012“

* 15 sufiĉe ampleksaj artikoloj en la ĈEA-retejoj esperanto.cz kaj muzeum.esperanto.cz (ĝenerale dirite, dum 2012 estis aperigitaj pro-

ksimume pli ol 60), 6 artikoloj en retejoj de neesperantistaj organizoj aŭ urboj, 4 artikoloj en blogoj, minimume 8 artikoloj pri Esperanto en la ĉeĥlingva Vikipedio kreitaj, kompletigitaj aŭ aktualigitaj

* 11 kulturaj aranĝoj por la publiko kun prezentaĵoj en Esperanto

* 15 prelegoj/diskutoj por publiko

* 2 libroj tradukitaj el Esperanto al la ĉeĥa kaj disponigitaj senpage en formo de elektronika libro + interretaj fotogalerioj, informado pri Esperanto en retejoj de Esperanto-kluboj k.a.

Specifa ampleksa informa aktiveco de ĈEA estas **ekspozicioj**:

1) ekspozicioj en Esperanto-Muzeo Svitavy — daŭra ekspozicio kaj tutjara temaj ekspozicioj („Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto“ kaj „125 jaroj de Esperanto“)

2) migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ sur 23 paneloj de formato A1 (kreita en marto 2010, ekde februaro 2011 migra, dum 2012 estis prezentita en 10 institucioj (plejparte bibliotekoj) de 8 urboj en 4 regionoj (i.a. en Landa Moravia Biblioteko en Brno, la dua plej granda kaj plej grava en Ĉeĥio), kelkloke ĝi estis ligita aŭ kun aparta inaŭgura programo aŭ kun publika prelego pri Esperanto kaj kun disponigo de informiloj

3) aliaj malgrandaj ekspozicioj (en Písek, tutjara en Tasovice)

Aparte estis resumitaj **rezultoj de eksteraj rilatoj kaj kunlaboro** kun neesperantaj subjektoj, precipe kun:

- 1) urbestroj (Svitavy, Pardubice, Břeclav, Bartošovice, Mladá Boleslav k.a. (aŭspicio kaj/aŭ financa subteno por E-aranĝoj, aperigo de esperanta versio sur sia oficiala retpaĝaro, komuna organizado de kulturaj programoj, diskonigo de la urboj eksterlande pere de Esperanto)
- 2) 7 bibliotekoj el 4 regionoj kaj aliaj instancoj okazigintaj la migran ekspozicion kaj akompanajn programojn (i.a. livero de informaj broŝuroj „Malkovru Esperanton“ al la bibliotekoj)
- 4) lernejoj (okazigo de Esperanto-kursoj en la Universitato en Brno)
- 5) muzeoj (komunaj kulturaj kaj prelegaj projektoj/aranĝoj en Olomouc, Litovel, Svitavy, Jaroměřice nad Rokytnou, Písek)
- 6) komunumoj de verkistoj kaj tradukistoj/interpretistoj (kontribuo al kulturaj aranĝoj, esperantigo de ĉeĥaj verkoj, eldono de dulingvaj ĉeĥaj-esperantaj libroj, artikoloj pri Esperanto en kulturaj gazetoj, komuna preparo de libro k.a.)
- 7) civitanaj grupiĝoj kaj hobi-societoj: Ĉeĥa Asocio de Filatelistoj (preparo de komuna tutŝtata ekspozicio), Asocio Brontosaurus Svitavy (vojaĝprelegoj en E-muzeo), Skolta Centro Vanaivan Kopřivnice (savo de Esperanto-monumento), Gaja Maljunulo Prago (E-kurso)

Plenumintoj:

Ĉefa komisiito de ĈEA pri informado kaj ekspozicia agado kaj kunordiginto de nia partopreno en la CIGNO-konkurso estas estraranino Pavla Dvořáková el Písek. Substrekendas, ke entute en la rolo de la ĉefa aŭtoro / organizanto / realiginto de ĉiuj menciitaj aktivecoj estis sume **ĉirkaŭ 50 aktivaj membroj de ĈEA.**

Al aparte agemaj en la koncerna fako apartenas L. Dvořáková el Svitavy, V. Dvořák el Moravské Budějovice, J. Drahotová, J. Vojáček, Z. Novotná, M. Kašparů, V. Kočvara, P. Chrdle, M. Turková, M. Malovec kaj aliaj. Kromhelpis ankaŭ membroj de lokaj kluboj kaj aliaj unuopuloj.

Al ĉiuj apartenas danko por ilia oferema laboro, kies suma rezulto alportis al ni ankaŭ financon premion de 42.000,- CZK, kiu helpas stabiligi nian asocian budĝeton kaj laŭeble subteni utilajn projektojn. La oficialan diplomon kaj suveniron transprenos nia reprezentanto dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko.

Pli detalan raporton kaj kompletan fotodokumentaron vi povas elŝuti en

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/ea-venkis-en-konkurso-de-la-fonda-o-cigno.html>.

Pavla Dvořáková

**Periodikum Českého
esperantského svazu - 44. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

**Předplatné v Česku (bez členství ve
svazu): 200 Kč**

Členská evidence a změny adres:

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice, vhirsx@email.cz, tel.
517 332 339**

Uzávěrka příštího čísla: 15.8.2013

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
- - 43-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
15.8.2013**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Peticio pri Esperanto

Peticion por oficialigi Esperanton kiel lingvon de EU, lanĉitan februare de 16-jara kostarika junulo, subskribis ĝis nun 5304 personoj, el ili 174 ĉeĥoj. La subskriboj estas kolektataj ĉe la retejo:

http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto_langue_officielle_de_IUE/

Ĉantorio 2013

La 16-an de junio 2013 esperantistoj renkontiĝis sur la monto Ĉantorio kaj komune kantis, vidu kaj aŭdu:

<http://www.youtube.com/watch?v=aAophzTrhu4>





La urbestro de Lipnice Inĝ. Leoš Bláha plantas Esperanto-arbon



Esperantlingva Ŝvejk inter fremdlingvaj eldonoj de la romano en la Memorejo de Jaroslav Hašek



Tiun ĉi kaŝtanon memore al Jaroslav Hašek dediĉas Ĉeĥa Esperanto-Asocio



Esperanto en Lipnice



Esperantistoj ĉe la plantita kaŝtan-arbo
fotoj de Adriana Suchanová



Antaŭ la Memorejo de Jaroslav Hašek
fotoj de Pavla Dvořáková